# *Sesiis en Havano la konferenco internacia Bioteknologio 2014.*



Kun la ?eesto de sciencistoj el 34 landoj fini?is en Havano la internacia kongreso *Bioteknologio 2014* kies lasta konferecno pritraktis la kontribuojn de tiu bran?o al mastrumo integrita de plagoj.

Pri tiu ?i temo prelegis Alberto Pantoja, prizorganto de produktado kaj protekto de kultivoj en reprezento de la organizo por nutrado kaj agrikulturo de UN (FAO).

Alia elstara partopreninto estis la profesoro Sjef Smeekens, de la nederlanda universitato de Ultrecht kiu prelegis pri la signaloj de la sukero en la kontrolo pri kreskado de plantoj.

La evento sesiis kun la ?eftemo *Agrobioteknologio por la agrobrutara da?ripovo* kaj anka?  okazis simpozio pri molekula interago inter plantoj kaj patogenoj.

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/41037-sesiis-en-havano-la-konferenco-internacia-bioteknologio-2014](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/41037-sesiis-en-havano-la-konferenco-internacia-bioteknologio-2014)

# Radio Habana Cuba